

Otakar Batlička, ĉeĥa Jack London

Oldřich Arnošt Fischer

Kluba prelego por Esperantista Klubo Brno, filia societo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, la 5-an de aprilo 2022.



*„Nesmíme zůstat pod botama vetřelců,
vlastenci mají právo i povinnost obětovat
svoji krev na oltář vlasti.“*

*„Ni ne devas resti sub ŝuoj de entrudiĝintoj,
patriotoj havas rajton kaj devon oferi
sian sangon sur altaron de sia patrujo.“*

*„Když jde o čest národa, je lepší jednat
a přitom se třeba zmylit – než nedělat nic!“*

*„Se temas pri honoro de la nacio, pli bone
estas agi kaj dume eĉ erari – ol fari nenion!“*

Otakar Batlička (1895 – 1942)

Rakontoj pri aventuroj en malproksimaj landoj ĉiam apartenis al favorata literaturo. Verkistoj **Jules Verne** (1828 – 1905) kaj **Karl Friedrich May** (1842 – 1912) verkis romanojn, kies agadoj okazis en la landoj, kiujn la aŭtoroj persone ne vizitis. Ili studis lernolibrojn, sciencan literaturon, raportojn de vojaĝantoj, kaj parolis kun homoj, kiuj el tiuj landoj revenis.

En la 20-aj jaroj de la dudeka jarcento ankaŭ kelkaj niaj verkistoj, precipe reprezentantoj de trampa movado (kies historion priskribis **Bob Hurikán** (1907 – 1965), propranome Josef Peterka), verkis aventurajn romanojn el Sovaĝa Okcidento de Usono, kiun ili neniam vizitis. Tiuj verkaĵoj, nomataj Poŝromanoj, kiujn post tralego atendis forĵetaĵujo, apartenis al literaturaj kiĉoj. Se liaj aŭtoroj estis saĝaj, ili konsiliĝis ekzemple kun **Zdeněk Matěj Kuděj** (1881 – 1955), kiu vagis tra Usono kaj eĉ nelonge tie laboris kiel kovbojo.

Heroo de nia rakonto, ĉeĥo Otakar Batlička, estis aŭtoro de aventuraj rakontoj, kiun ni povas kompari kun **Jack London** (12. I. 1876 – 22. XI. 1916).

Pri **Jack London** oni scias, ke li estis needzeca filo de **Flora Welmann** kaj irlanda astrologo **William Henry Chaney**, tial li propranome nomiĝis John Griffith Chaney, sed sian familian nomon li ricevis de sia nepropa patro John London.

Li laboris en fabriko por konservaĵoj, ŝtelis ostrojn (manĝeblajn marajn moluskojn *Ostrea edulis*), fariĝis ĉeborda fiŝista gardisto, poste maristo, vagabondo kaj orserĉisto. Volante akiri pli grandan klercon li ekstudis en Universitato Berkley, sed lia studado estis nesukcesa. Li legis kaj poste ekverkis aventuran literaturon. Scio de malbonaj vivkondiĉoj de laboristoj gvidis lin inter socialistojn kaj sindikatanojn (la romano La Fera Kalkano, *The Iron Heel*, 1907). Dum rusa-japana milito London estis militraportisto.

Komence lia verkado ne estis sukcesa, oni li kritikis, ke skribas krude, sed poste li fariĝis fama kaj adorata usona verkisto. Li riĉigis, sed ne sciis kun sia mono bone mastrumi. Multe da homoj lin profituzis kaj trompis. Kun sia jaĥto Snark li preskaŭ dronis en maro. Lia luksa Lupa Domo elbrulis. Ankaŭ liaj amrilatoj al virinoj ne estis feliĉaj. Dum tuta vivo li havis problemojn kun alkoholo (tion li priskribis en siaj aŭtobiografiaj romanoj *Martin Eden* (1909) kaj *John Barleycorn* (1913). Kaŭze de drinkado li damagis siajn hepaton kaj renojn. Por ne suferi dolorojn, li uzadis morfion, kies lasta tro alta dozo kaŭzis lian morton (1916).

Otakar Batlička naskiĝis la 12-an de marto 1895 en Prago. Lia patrino **Božena Batličková** mortis kiam Otakar estis nur 3-jara- Lia patro **Antonín Batlička** poste edziĝis kun **Marie Hanýšková**. Li estis oficisto de gasfarejo, kiu laboradis ĝis vesperoj kaj por edukado de sia filo ne havis sufiĉe da tempo. Knabo vagis tra stratoj de granda urbo serĉante amikojn inter knaboj de sia aĝo.

Infana kromnomo de Otakar Batlička estis la sama kiel la kromnomo de fondinto de esperanto Zamenhof: Barono.

Li estis talentita lernanto, sed tre nekonforma. Ofte li havis konfliktojn kun rigora patro, instruistoj de baza lernejo kaj poste profesoroj de teĥnika linceo, kiujn li provokis.

Malbona rilato al profesoro de naturscienco kulminis, kiam la profesoro Batličkon demandis: „Kiom da elefantaj specioj vi scias?“ – „Tri.“

„Batlička, oni nur du speciojn scias. La elefanton hindian (*Elephas maximus*) kaj la elefanton afrikan (*Loxodonta africana*).“

„Sed mi ankaŭ la trian elefanton scias,“ arogante kontraŭdiris puberulo Otakar rigardante facon de la pedagogo. La profesoro la ofendon ekkomprenis...

Otakar revis pri aventuroj en malproksimaj landoj. Tial li provis fuĝi eksterlanden. La 9-an de januaro 1912 en Germanio polico kaptis lin kaj du aliajn knabojn. Ili planis enŝipiĝi kaj iri en Usonon. Batlička estis kondiĉe kondamnita al trimonata malliberejo.

Li ŝtelis monon de sia patro kaj denove fuĝis.

Lia kunulo estis iu **Josef Archer** el Ostrava. En Germanio knaboj fariĝis helpantoj de la cirko *Sarassani*, kiu nomadis en havenan urbon Hamburgon. En Hamburgo Otakar dungiĝis kiel junmaristo de la ŝipo, kiu iris en Argentinon. Li ne sciis hispanan lingvon kaj devis gajni monon per okazaj laboroj.

Oni diras, ke baldaŭ lia patro ricevis bildkarton el Argentino kun konciza mesaĝo: „Mi havas neniun manĝaĵon, mi ne scias, kie mi dormos, mi fartas bonege. Oto“.

Kiam la unua mondmilito komenciĝis (1914), Batlička, la civitano de Aŭstrio-Hungario, devis reveni hejmen. Norvega vaporŝipo Olaf portis krudaĵojn por Germanio, tial la 12-an

de januaro 1915 britoj ĝin dronigis. Otakar devis batali por sia vivo en malvarma mara akvo, sed transvivis. Britoj Batličkon savis, sed kiam ili eksciis, ke li uzis falsitajn dokumentojn, ili lin malliberigis en barakaro por militkaptitoj en Manksinsulo (en Irlanda Maro, inter Anglio, Kimrio, Irlando kaj Skotlando). Bonŝance britoj eksciis, ke li ne estas danĝera, kaj la 23-an de novembro 1915 lin eĉ akceptis en britian armeon. Tie Otakar konatiĝis kun radiotelegrafio.

En fino de oktobro 1918 Batlička aperis en Prago, repacigis je sia patro, kiel voluntulo volis batali kontraŭ poloj kaj hungaroj, kiuj endanĝerigis Ĉeĥoslovakion, sed baldaŭ li denove forveturis, en Novjorkon, kie li kelkajn monatojn laboris kiel stiranto de metroo. Li setligis nur en januaro 1920.

La 29-an de aprilo 1920 li edziĝis kun **Marta Špačková**, 24-jara oficistino de Ruĝa Kruco el Pilzeno.

Batlička parolis germanan, anglan kaj hispanan, bonege pafis kaj ĉevalrajdis, sed neniam faris ekzamenon pri matureco, krom tio li estis kondiĉe kondamnita, tial post reveno el eksterlando li ne povis trovi bonan laboron. En praga centro de YMCA (*Young Man Christian Association*, Asocio de Junaj Kristanaj Viroj) li interpretis, serĉis laboron ĉe polico. Nelonge li estis oficisto de transporta kompanio Hamburga-Usona Lineo. La 1-an de junio 1924 li fariĝis komerca gvidanto de la firmao Singer.

Li fondis privatan lernejon de bokso, akompanis eksterlandajn turistojn, fariĝis sporta piloto, estis nokta gardisto kaj pordisto, esploris purigan polvon, kiun li hejme fabrikis kaj poste vendis, asekuris hundojn, estis konduktoro kaj stiranto de tramoj.

Nur en la jaro 1927 li trovis bonan laboron en propagacia departemento de Elektraĵ Entreprenoj de Ĉefurbo Prago. Li interesiĝis pri ĉevaloj. Sur motociklo li partoprenis en konkurso irante trans tuta respubliko. Li trejniis pafadon kaj oni diras, ke bonege pafis.

Precipe li estis arda radioamatoro. En la jaro 1929 hejme en antaŭĉambro li konstruis amatoran radioelsendejon kun la marko OK 1 CB. La 3-an de marto 1932 li ricevis oficialan permeson por legala amatora radioelsendado. Dum 270 laboraj horoj li atingis kontakton kun milo da radioamatoraj elsendejoj. Li ricevis diplomon WAC, kiun usona kompanio donis al la radioamatoroj, kiuj atingis radian kontakton kun radioamatoroj de ĉiuj kontinentoj. Oni diras, ke lia radioelsendejo havis pli altan teĥnikan nivelon ol la radioelsendejo de Ĉeĥoslovakia Radio. Li proponis instaladon de mikrofonoj kaj laŭparoliloj en pragajn tramojn.

En Prago li loĝis en la Strato Ĉiklova, 624/7, kie nuntempe li havas memoran tavolon. Iam Batlička kaptis signalon de kraŝanta japana ŝipo. Li elsendis ĝiajn koordinatojn ĝis li alvokis helpon. Pro tio li ricevis dankon de japana ambasado.

Li eltrovis elektran lampon, kiu havis kvar gradojn de efiko (15 W, 25 W, 40 W kaj 75 W). En la jaro 1930 li aranĝis senpagan kurson de radiotelegrafio por junularo.

Politike li estis organizata en Ĉeĥoslovaka Nacia-Socialista Partio.

En tiu tempo okazis multaj akcidentoj en minejoj. Batlička volis helpi al ministoj, kiuj ofte fariĝis viktimoj de la akcidentoj. Dum kelkaj monatoj li eltrovis komunikilon, kiu ebligis kontaktoj de ministoj kun savistoj dum savaj laboroj en minejoj. Tio estis malgranda kurtonda dissendilo-ricevilo. La 15-an de februaro 1934 li eksperimente elsendis el karbominejo Mayrau en Vinařice apud Kladno.

Oni lin sciis kiel honoran amikon, bonkorulon, optimiston, kiu havis organizan talenton.

Radioamatora Klubo Nusle lin petas prelegi al junuloj pri radiotelegrafio. Per sia entuziasmo Batlička al radioamatorismo altiris multe da junuloj.

La 24-an de oktobro 1936 li prelegis pri signifo de radioamatoroj por defendo de ŝtato.

Ĉeĥoslovakia armeo volis kontaktigi germanajn kontraŭnaziojn kaj elmigrintojn. Batlička helpis, ĉar en Berlino li havis kontaktojn kun sinjorino Margarete della Reder, posedantino de fabriko por ŝovantenoj, kiujn uzis germana armeo.

La 30-an septembro 1938 konferenco de reprezentantoj de Germanio (Adolf Hitler), Italio (Benito Mussolini), Grandbritio (Nevil Chamberlain) kaj Francio (Edouard Daladier) decidis pri sorto de Ĉeĥoslovakio. La respubliko devis doni siajn ĉelimajn teritorion (Sudetojn) al Germanio. Radioamatoroj perdis permesojn por sia laboro. Oni konfiskis iliajn radioelsendejojn. Slovakio fariĝis Slovaka Ŝtato.

La 15-an de marto 1939 germana armeo okupaciis restaĵon de Ĉeĥoslovakio kreante Protektoraton Bohemio kaj Moravio (*Protektorat Böhmen und Mähren*).

Tre signifa estis literatura laboro de Batlička. Ekde la jaro 1935 en Ĉeĥoslovakio oni eldonis ĵurnalon por junularo. Ĝia nomo estis Juna Heroldo (*Mladý hlasatel*). La ĵurnalo estis tre populara. Iam redaktoroj de la ĵurnalo faris interesan agadon. Oni publikis la anoncon, ke ie en Prago troviĝas la viro, kiu portas falsan plenbarbon. Kiu trovos la viron, kaptos lian barbon dirante „Mi vin tenas, mi vin tenas, viajn vortojn ne respektas!“ („*Mám tě, mám, na tvá slova nic nedám!*“) kaj alkondutos lin en redakcion de Juna heroldo, tiu ricevos finanĉan premion. Tiam en Prago falis multe da vangofrapoj, ĉar homoj kaptis virojn kun veraj plenbarboj. Tiu afero estis nur unu el propranaturaj ŝercoj de Juna Heroldo.

En septembro 1938 oni ekeldonis la 4-an jarkolekton de Juna Heroldo, sed post eldono de la 4-a numero oni la eldonadon intermitis, ĉar ĉefredaktoro d-ro **Břetislav Mencák** (1903 – 1981) devis soldatiĝi. Redaktoro de Juna Heroldo fariĝis skolta gvidanto **Jaroslav Foglar** (skoltanome Jestřáb/Akciptiro, 1907 – 1999) kaj ĉefredaktoro d-ro **Karel Bureš**. En decembro 1938 en la 7-a numero de Juna Heroldo aperis rakontoj pri aventuroj de kvin knaboj, kiuj havas la klubon Rychlé šípy (Rapidaj Sagoj). La klubanoj nomiĝis Mirek Dušín, Jarka Metelka, Jindra Hojer, Červenáček kaj Rychlonožka.

Inĝeniero E. Jirát rekomendis al Jaroslav Foglar rakontiston Batlička-on.

En januaro 1939 alvenis en redakcion de la ĵurnalo Juna Heroldo grizethara, altstatura, iomete korpulenta viro. Evidente oficisto. Li suferis de ĥronika nazkataro kaj stomakaj ulceroj. Neniu lin rigardus la aventuristo, kiu jam travivis pli multe ol kiu ajn el liaj samaĝuloj. Sed li estis bonega rakontanto! La 28-an de januaro 1939 oni en Juna Heroldo publikis lian la unuan rakonton „Ni vokas Hurst-on, ni vokas Hurst-on!“ („*Voláme Hurst, voláme Hurst*“). Dum ne plenaj tri jaroj Batlička verkis pli ol 150 rakontoj. Ili estis parte aŭtobiografiaj. Batlička ilin verkis hastante, kvazaŭ li scius, ke al li restis nur malmulte da vivtempo. Ja tiam li estis telegrafisto de rezista kontraŭnazia grupo Obrana národa (Defendo de la Nacio)!

Rakontoj de Batlička havas mallongan ekspozicion (enkondukon) kaj ili estas altiraj por gejunuloj.

Longa rakonto „Veto en la Klubo de Usona Geografia Societo“ („*Sázka v klubu AGS*“) temas pri konkurso de *American Geographic Society* (AGS). Kiu ĉasos dek diversajn rabajn bestojn en dek landoj de la mondo, tiu ricevos 100 000 usonajn dolarojn.

Kiam germanaj nazioj okupaciis restaĵon de Ĉeĥoslovakio, jam la 19-an de marto 1939 eksaj ĉeĥoslovakaj generaloj **Sergej Ingr** (1894 – 1956), **Josef Bílý** (1872 – 1941) **Sergej Nikolajevič Vojcechovský** (1883 – 1951) kaj **Alois Eliáš** (1890 – 1942) fondis subteran armeajn organizon **Defendo de la Nacio (Obrana národa)**, kiu batalis kontraŭ nazioj. Altstatura (185 cm) viro Otakar Batlička baldaŭ fariĝis telegrafisto de la grupo Oriento de Defendo de la Nacio. Li transdonis informojn orienten kaj okcidenten.

Sed nazioj multajn membrojn de Defendo de la Nacio malliberigis kaj ekzekutis.

En majo 1941 okupantoj haltigis eldonadon de Juna Heroldo.

La 14-an de oktobro 1941 nazioj Batličkon malliberigis. En Palaco Petschek li silentis, tiel nazioj lin tiel kruele batis, ke li perdis konscion, Oni lin transportis en malliberejon de Pankrác. Poste de tie Batlička estis transportita en Terezín-on.

La 14-an de januaro 1942 nazia juĝo lin kondamnis al morto. La 6-an de februaro 1942 oni lin transportis en koncentrejon en Mauthausen.

Kuracisto **Eduard Krebsbach** (1894 – 1947) ŝatis mortigi malliberulojn per injektoj de benzino en iliajn korojn. Tiel li mortigis 900 polajn, rusajn kaj ĉeĥoslovakiajn malliberulojn. (Pro tiuj krimoj oni lin post la milito ekzekutis.)

Vendrede la 13-an de februaro 1942 tiu militkrimulo kun siaj helpantoj ekzekutis 11 malliberulojn. Inter ili estas Otakar Batlička. Radio laŭte ludis germanajn kantojn, por ke la malliberuloj opiniu, ke temas nur pri banala sanitara agado. Sed helpantoj de kuracisto malliberulon ektenis kaj militkrimulo Krebsbach rapide pikis benzinan injektaĵon rekte en lian koron. Germanoj kun „scienca“ intereso observis la agonion de viktimo kaj ĉion skrupule enprotokoligis. Otakar Batlička mortis je la 15:16.

La 26-an de februaro 1942 oficisto de Gestapo donis al vidvino cindron. Ŝi ĝin metis en tombon en tombejo de Prago-Vinohrady.

Bohumil Jírek (1935 - 1981) adaptis multe da rakontoj el postlasaĵo de Batlička.

En la 60-aj jaroj oni publikis rakontojn de Batlička en la ĵurnaloj *ABC mladých techniků a přírodovědců*, *Tramp*, *Pošumavský hlasatel*, *Skaut-Junák* kaj *Rychlé šípy*.

Rekomendita literaturo

BATLIČKA, O. 1968: Na vlně 57 metrů. 2-a eld., Ostrava, Profil, 142 paĝoj.

BATLIČKA, O. 1969: Rájem i peklem. 1-a eld., Prago, Mladá fronta, 84 paĝoj.

BATLIČKA, O. 1970: Tábor ztracených. 1-a eld., Ostrava, Profil, 191 paĝoj.

BATLIČKA, O. 1979: Tanec na stožáru. 1-a eld., Prago, Mladá fronta, 139 paĝoj.

BATLIČKA, O. 1989: Na vlnách odvahy a dobrodružství. 1-a eld., Ostrava, Profil, 447 paĝoj.

BATLIČKA, O. 1992: Kavalíři odvahy. 1-a eld., Ostrava, Sfinga, 267 paĝoj.

BATLIČKA, O. 2002: Sázka v klubu AGS. Příběhy, povídky a kreslené seriály ze starých časopisů Mladý hlasatel a Vpřed z let 1939 – 1948. 1-a eld. Prago, Loprez, 270 paĝoj.

FISCHER, O. A. 2018: Zdeněk Matěj Kuděj (1881 – 1955). www.literatura.bucek.name//brno//fischer_zdenek-matej-kudej.pdf, La 17-an de oktobro 2018.

GIBSON, F. 1963: Zrzoun. 1-a eld., Prago, Státní nakladatelství dětské knihy, 115 paĝoj.

HORÁKOVÁ, L. 1993: Haďák aneb Osud karikaturisty v Čechách. 1-a eld., Praha, Mladá fronta, 175 paĝoj.

HURIKÁN, B. 1990: Dějiny trampingu. 2-a eld. Prago, Novinář, 272 paĝoj.

LONDON, J. 1966: Démon alkoholu. Tulák po hvězdách. 1-a eld. Prago, Odeon, 444 paĝoj.

NOVÁKOVÁ-PLEVOVÁ, E. 2017: Zdeněk Matěj Kuděj. Věčný tulák. 1-a eld., Pelhřimov, Nová tiskárna, 42 paĝoj.

PADEVĚT, J. 2013: Průvodce protektorátní Prahou: místa – události – lidé. 1-a eld., Praha, Academia, Archiv hlavního města Prahy, 804 paĝoj.

PICK, J. R. 1967: Ruce vzhůru, boys aneb Kniha o životě a smrti. 1-a eld., Praha, Československý spisovatel, 108 paĝoj.

STONE, I. 2009: Námořník na koni. 1-a eld. Brno, Jota, 328 paĝoj.

ŠIKL, J. 1981: Legendy o divokém Západě. 1-a eld. Praha, Práce, 222 paĝoj.